



PILO-PRESS

Internacia
Informservo



Eidonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

"Iru kun ĉi! Mi ne
bezonas viajn nova-
ĵojn. Mi mem legas
Pilo-Press!"

N-ro 37/1975 21 oktobro 1975
Aperas ĉiusemajne

Ekspérimenta instruado de Esperanto oficiale aprobita

Hannover (pp) La kulturministro de la federacia lando Niedersachsen (Malsupra Saksujo) per letero de la 29-a julio 1975, aktosigno 301 MV 26-1/2, informis la rektoron de la elementa lernejo Dollbergen kaj ILLEI-prezidanton Helmut Sonnabend, ke la lerneja eksperimento "Esperanto en elementaj lernejoj" estis aprobita por la elementaj lernejoj Dollbergen, Balge kaj Fröbelschule Peine.

Krome la kulturministro ekzamenos la eblecojn pri okazigo de kleriga kurso de Esperanto por instruistoj en la jaro 1976.

Ĝiropa Esperanto-Kongreso 1976

Eindhoven, NL (pp) Kiel ni jam informis, la Ĝiropa Esperanto-Kongreso 1976 (E.E.K.) okazos paske 1976, de la 16-a ĝis la 19-a de aprilo 1976, en la tre moderna, bone ekipita Kultura Centro de Philips (P.O.C.) en Eindhoven.

Kongresaj temoj estas: 1) La ekonomikaj aspektoj de la lingvo-diverseco
2) La sekvoj de lingva superregado

Por enkonduki la kongresajn temojn estos elektitaj la plej kompetentaj prelegantoj.

Ĉiuj kongresaj aranĝoj okazos en la kongresejo mem: prelegoj, kunidoj, festvespero, balo, filmprezentadoj kaj la komunaj manĝoj.

Estos prezentata la tute nova filmo pri Grekujo, speciale preparita por la venonta Universala Kongreso de Esperanto en Ateno. La E.E.K. do estos unika okazo por spekti ankaŭ tiun ĉi belan filmon.

Dum la festvespero prezentos sian programon la Pola Amatora Dancensemblo "Cracovia". "Cracovia", la eindhovena kant- kaj dancensemblo konsistas el infanoj, kies gepatroj estas poldevenaj. Jam plurfoje ili vizitis Pollandon kaj krome ili prezentis sian programon en la Nederlanda Televido.

La kongresejo estas tre proksima al la hotelo "Holiday Inn", en kiu la LKK sukcesis rezervigi multajn ĉambrojn por la kongresanoj. Ankaŭ aliaj bonaj hoteloj estas rezervitaj.

Aliĝiloj kaj detalaj informoj pri hoteloj kaj pri la favorprezaj manĝeblecoj en la kongresejo estas riceveblaj ĉe la sekretario de la LKK, Floraplein 23, Eindhoven, Nederlando.

Esperanto en Bavario

Nürnberg/Augsburg (pp) Sub la devizo "Ĉiuj bavaroj ŝatas Esperanton" Esperanto-Informservo Nürnberg startis kampanjon por intensa informado kaj varbado por Esperanto en Bavario. La kampanjo daŭros plurajn jarojn. Unu el la kulminoj de la kampanjoj estos granda Esperante-ekspozicio en Augsburg, de la 24a de aprilo ĝis la 9-a de majo 1976, kiun aranĝos Libroserve Ludwig Pickel, Nürnberg. Dank' al la bonaj rilatoj de Hermann Schmid al la urbaj instancoj la urba administracio de Augsburg senpage disponigos la ekspoziciejon en la urbedome. Lige kun la ekspozicio okazos diversaj Esperanto-aranĝoj.

Junaj gvidantoj en Italujo

Romo (radioroma/pp) Dum kunsido okazinta en Milano, la 12-an de oktobro, la nova konsilantaro de la Itala Esperanto-Federacio (IEF), kiu estis elektita dum la nacia kongreso en Triesto dum septembro, disdonis la taskojn de prezidanto, vicprezidanto, sekretario kaj redaktoro de la oficiala organo "L'Esperanto". La rezulto de la balotoj montras kompletan junigon de la gvidantaro.

Prezidanto de FEI fariĝis d-ro Nicola Minnaja (naskiĝjaro 1938-a), vicprezidanto d-ro Antonio De Salvo (naskiĝjaro 1942-a), unu el la du sekretarioj estas Riccardo Pinori (naskiĝjaro 1941-a), kaj redaktoro d-ro Silvio Stoppoloni (naskiĝjaro 1950-a).

La agoj de la prezidanto kaj de la vicprezidanto praktike egalas, sume, al tiu de la antaŭa prezidanto, inĝ. Giordano Azzi, kiu forlasis la prezidantecon pro nebona farto kaj troa okupiteco. Intere estas la fakto, ke d-ro De Salvo lernis Esperanton de d-ro Minnaja, kiam ili vizitadis la saman liceon - kompreneble en diversaj klasoj - fine de 1956.

Cetere, d-ro De Salvo, estas ankaŭ redaktoro de la Esperanto-elsendoj de Radio Roma.

61-a Universala Kongreso de Esperanto

Rotterdam (pp/uea) Aperis la 1-a Oficiala Komunikilo pri la 61-a UK en Ateno 1976, el kiu ni citas:

La kongreso okazos sub la protekto de s-ro Georgios Ralis, ministro de la prezidanteco de la registaro, kaj kun forta subteno de ŝtataj kaj urbaj instancoj. Honora komitato estas formata.

La loka kongresa komitato havas 17 lokajn membrojn, prezidanto estas s-ro G. Miggas.

Jam du instancoj, la ministerio de civilizo kaj la urbo Ateno, esprimis la deziron akcepti regali reprezentantojn de la kongreso.

20-minuta, 16-milimetra kolorfilmo turisma pri Grekujo, preparita de la Greka Nacia Turisma Oficejo kunlabore kun la LKK, varbas por la kongreso. Ĝi estas mendebla ĉe UEA.

La Greka Nacia Turisma Oficejo decidis eldoni kvar belajn fotoafilaĵojn pri Grekujo kun surskribo en Esperanto en eldonkvanto de po 1 500 ekzempleroj.

Bonaj loĝkondiĉoj en Ateno. Kongresanoj, kiujn ŝokis la altaj restadkostoĵoj en Kopenhago pasintjare, sentos agrablan financon kontraston en Ateno. La greka ĉefurbo estas plena de restoracietoj, kie oni povas manĝi rapide kaj malmultekoste. Pli grave, la hotelkostoĵoj estas ĝenerale moderaj, kaj la LKK disponas pri granda nombro da unupersonaj ĉambroj en la studenta domo de la Universitato de Ateno - tiu sama domo, kiun tiel laŭdis la partoprenantoj de la Postkongreso de 1973. Ĉiuj ĉambroj havas telefonon kaj balkonon, la prezo estas malalta, kaj la domo situas en tre agrabla kvartalo (Zografu). Mendiloj kun detalaj prezoj aperos en la Dua Bulteno.

Nova kongresa peranto por FRG estas S-ino Margarete Klünder, 4430 Burgsteinfurt, Schützenstr. 13, konto 4401329 ĉe Deutsche Bank, Burgsteinfurt. La baza kongresa kotizo ĝis la 31.12.75 estas 135 n. gld.

Ĝis la fino de septembro aliĝis 164 personoj.

IEF-kongreso en itala fervoja gazeto

Rome (pp) Laŭ informo de Radio Romo en n-ro 8-9 de aŭgusto-septembro de fervojista gazeto "Voci della Rotaia," aperis kvarkolumna artikolo pri la IEF-kongreso en Villach, verkita de C.V. Cattaneo.

Andrzej Pettyn salutas

Helsinki (pp). Andrzej Pettyn, redaktoro de Pola Radio, dum oktobro denove restadas en Finnlando. Dum la Esperanto-Ekspresoj de la pasintaj du semajnoj oni disaŭdigis liajn korespondaĵojn pri Esperanto-aranĝoj en tiu lando. El tiuj korespondaĵoj oni eksciis, ke la prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin kaj lia edzino, faris tre sukcesan prelegvojaĝon tra Finnlando. Ges-roj Tonkin estis akceptitaj ankaŭ en la ministerio por eksterlandaj aferoj.

Per poŝtkarto Andrzej Pettyn transdonis salutojn al ĉiuj legantoj de Pilo-Press.

Esperantonytt en 52 000 ekzempleroj

Stockholm (pp) En eldonkvanto de 52 000 ekzempleroj aperis speciala numero de svedlingva informgazeto "Esperantonytt". La gazeto enhavas, sur 8 grandformataj paĝoj, intervjuojn kun gejunuloj, kiuj partoprenis la kongreson de TEJO en Fredericia, Danlando, artikolon pri Esperanta literaturo, pri UEA kaj pri la Esperanto-movado en Svedio. Tutan paĝon okupas artikolo pri persekutoj kontraŭ Esperanto. Pluraj mallongaj artikoloj temas pri aktualaĵoj el la Esperanto-movado, ekzemple pri la Universala Kongreso.

La gazeto estis distribuita senpage, kaj ĝi precipe utilis por la aŭtuna informa laboro de la svedaj Esperanto-kluboĵ. La gazeto estis presita en gazeta rotacio sur ordinara ĵurnala papero. Pro tio la prezo fariĝis tre malalta, kio siavice ebligis la altan eldonkvanton. (Laŭ Radio Roma)

Novaĵoj el Paderborn

Paderborn (pp). En diversaj elementaj lernejoj de Paderborn komencigis dum septembro 9 Esperanto-kursoj por infanoj. Organiza portanto de la kursoj estas la Societo por lingvolim-transpaŝa eŭropa interkompreniĝo "Eŭropa-Klubo". La sciencan akompanadon prizorgas la Instituto por Kibernetika Pedagogiko.

Delegacio de la Liberaldemokrata Partio (F.D.P.) sub gvido de la parlamentanoj Wlter Hirsche kaj S-ino Tomei de la parlamento de Malsupra Saksujo, Hannover, vizitis la esplorcentron (FOLL) en Paderborn por sin informi ĉefe pri la instruado de planlingvo kaj informadiko. La delegacio vizitis ankaŭ la lernejajn klasojn, en kiuj oni nuntempe instruas Esperanton.

Eŭropa Seminario pri junularo?

Lieĝo (pp) Kadre de la venontjaraj Someraj Universitataj Kursoj oni intencas aranĝi eŭropan seminarion pri la "sociaj karakteroj de la eŭropa junularo".

Esperantaĵoj en aŭkcio

Romo (pp) Ĉiam pli ofte oni trovas, en katalogoj de aŭkcioj, la indikon pri vendataj esperantaĵoj. Nun estas la vico de la firmao Hagedorn & Co el Limburg, FRG, kiu dum sia 43-a filatela aŭkcio, okazinta la 27-an de septembro 1975, ankaŭ ofertis kelkajn Esperanto-glumarkojn kaj 2 Esperantopoŝtostampoĵn. Estas eble interese ekscii la prezon petitan por la stampoj: La unua peco estas registrita letero aerpoŝta de la 1-a de aŭgusto 1925, el Genevo al Casablanca kun la speciala stampo "17-a Universala Esperanto-Kongreso", kaj por ĝi oni postulis 65 germanajn markojn; la dua peco estas presaĵo kun stampo de Vieno, okaze de la 28-a Universala Kongreso de 1936, kaj por ĝi oni petis 38 germanajn markojn. Ankaŭ en la ĵusa katalogo de la konata franca firmao SIMART el Parizo estas aŭkcio ofertata Esperanto-poŝtostampo. (Radio Roma)

Memore al la mortintoj

En Varsovio mortis - laŭ informo de Radio Varsovio - la Esperanto-pioniro kaj aganto Jan Zawada, en la aĝo de 84 jaroj. Li estis antaŭ la milito laŭ Enciklopedio de Esperanto ĉefa gvidanto de la klasbatala Esperanto-Societo en Pollando "Labero" kaj aŭtoro de vortaro E-pola. Li faris kursojn, prelegojn, tradukis kaj verkis artikolojn en multaj E-revuoj. Profesie li okupis sin pri la kooperativa movado. En la Esperanto-Ekspreso de la 19/20 oktobro Pola Radio dediĉis al la mortinto honorigan nekrologon.

Radio Vieno informis en sia leterkesto de la 18/19 oktobro, ke elmondiĝis la bone meritinta financ-fakinspektoro Hans Steiner sen., en sia 66-a vivojaro, la 9-an de oktobro en Wörgl, kie staras ekde 1952 la iniciatita de li Zamenhof-Monumento, kiu memorigos estonte ne nur pri la majstro mem, sed ankaŭ pri unu el ties plej fidelaj disĉiploj.

Tri Esperanto-rilataj stratoj en Frankfurt

Frankfurt/M (pp) En unu el siaj lasttempaj leterkestoj Radio Romo citis leteron de s-ino Elfriede Kruse, Frankfurt/M, kun jena interesa novaĵo: "La magistrato en Frankfurt, laŭ iniciato de la loka E-Societo, donis al tri stratoj en novkonstruita kvartalo la nomojn, respektive, "Esperanto", "Zamenhof", kaj "Carl Barthel", ĉi tiu lasta fondis la Esperanto-grupon en Frankfurt."

Ne plu konstanta konkurso

Varsovio. Malmultaj leteroj kaŭzas problemojn kaj zorgojn; multaj korespondaĵoj kreas aliajn problemojn. La Esperanto-Redakcio de Pola Radio devis - pro la alfluo de sufiĉe multaj alskriboj, inter ili ankaŭ multaj interesaj - nuligi la konstantan konkurson pri la plej interesaj leteroj de la monato. Nuntempe pri tiu decido okazas diskuto inter la aŭskultantoj. Dum 1975 la Esperanto-Redakcio ricevis ĝis nun preskaŭ 3 700 korespondaĵojn. Tiu ĝisnuna stato ne pravigas la optimisman antaŭvidon, ke oni atingos ĝis-fine de la jaro la "kosman" rekordan nombron de 5000 korespondaĵoj. Sed ke tia miraklo tamen okazu, tio dependas de la aŭskultantoj. Necesus nur 150 korespondaĵoj ĉiusemajne kaj la nombro estus atingita!

Cetere, nuntempe en la redakcio regas viron - nome Barbara Pietrzak, Jerzy Grum estas en forpermeso, A. Pettyn en Finnlando....

Bern. Post sia kelksemajna rakontado pri la Esperanto-migrado en la svisa montaro, ges-roj Gacond komencis novan serion de prelegoj, nome pri "Literatura Mondo". - Cetere, la elsendo de D-ro A. Baur, lunde, la 20 oktobro, tageze, entute ne estis aŭdebla. Anstataŭe oni aŭdis svisgermanan elsendon. Ĉu eraro de la programisto?

Pri neologismoj en Radio-Elsendoj

D-ro J. Konder, Neuwied, skribis al Radio Roma: "Lastatempe mi ofte kaptas vin kaj sukcese. Ĝenis min la nova vorto "itinerero", ĉar mi trovis ĝin nek en "Plena Vortaro", nek en la vortaro de la hungaro A. Pečan. Nature mi scias, kion vi pensas sub tiu vorto, sed kial uzi neologismon, se vi povas preni ordinaran vorton, kiel ekzemple gvidlibro, gvidilo, informilo, mapo, ktp."

D-ro A. De Salvo respondis i.a.: "Ni petas senkulpigon pro tio, ke ni uzis neologismon, kiu evidente ne estas ankoraŭ sufiĉe komprenebla internacie, kiel pruvas la fakto, ke la interpretoj de d-ro Konder ne estas ĝustaj. Laŭ "PIV", ja, la vorto "itinerero" signifas "tutaĵo de la irotaj vojoj inter la deirpunkto kaj la celo de vojaĝo, veturo, ktp.", aŭ "prezento grafika de la distancoj kaj direktoj trairetaj de esploristo aŭ termezuristo", aŭ "sinsekvo de la trakoj kaj forkoj, kiun povas traveturi trajno tra stacio."